# Esperantaj vojaĝoj kiel unu el la formoj de kulturcela turismo

*Dorota MĄCZKA*

## Enkonduko

La termino **turismo** ampleksas vojaĝojn kaj restadojn de homoj en aliaj regionoj, landoj kaj kontinentoj. La celo de tiu migrado estas vizitado de vidindaĵoj, ripozado, sanzorgoj aŭ studado pri la regionoj, urboj, valoraj, belaj aŭ famaj konstruaĵoj, aŭ iaj ajn kuriozaĵoj. Franca sciencisto, *M. Boyer*, emfazas la socian karakteron de la turisma movado. Li difinas tiun movadon kiel vojaĝojn kun ekkona, kultura kaj eduka karaktero. Antaŭ 200 jaroj oni ankoraŭ ne parolis pri turismo, ĉar nur malmultaj homoj vojaĝis. La vorto (fr. *tourisme*) venas de la kutimo de junaj nobelidoj, kiuj en la fino de siaj studoj plenumadis grandajn rondvojaĝojn tra la ĉefaj kulturlandoj de Eŭropo (fr. *tour* - rondiro, ĉirkaŭiro). Poste, la kutimo komencis disvastiĝi inter ĉiuj riĉaj klasoj kaj sekve, turismo iĝis komuna sfero de la homa aktiveco. Tiam la senco de la termino "turismo" alprenis ankaŭ tiun nuancon.

La emo al vojaĝado por simpla plezuro, por malkovrado de novaĵoj, aliaj landoj, kuriozaĵoj, famaj lokoj aŭ homoj, ekzistas jam delonge. Dum la 20-a jarcento turismo iĝis amasa fenomeno. En multaj landoj ĝi estas grava ekonomia branĉo, simila al la industrio. Grandnombra alfluado de turistoj tamen ofte endanĝerigas la naturan medion. Tial ekestis la tendenco al ekologia turismado, kiu klopodas laŭeble malmulte damaĝi la naturon kaj la vivon de la regionoj (*W.Gawarecki*, 1997).

La kultura turismo estas nova kategorio de turismo. Ĝi estas unu el tiuj specoj de turismo, kiuj lastatempe disvolviĝas plej rapide. Konfirmas tion, interalie, la dokumento "Turismo 2020", prilaborita de la Monda Organizaĵo pri Turismo, prognozanta surbaze de tendencoj, videblaj en la elvoluintaj landoj, rimarkindan progreson de interesiĝo pri edukaj elementoj, pri internaj spertoj, pri distraj elementoj en turisma esplorvojaĝo. La nuntempaj turismaj-kulturaj ekskursoj estas la preferataj formoj de aktiva pasigado de libera tempo por miliono da homoj en kaj ekster Eŭropo.



### Esperanta kulturkoniga turismo

Kulturan turismon oni difinas kiel ĉiujn grupajn kaj individuajn vojaĝojn, havantajn turisman karakteron, en kiuj gravas kultura enhavo. En tiuj vojaĝoj kontaktoj de la partoprenantoj kun arkitekturaĵoj, okazaĵoj kaj aliaj valoroj de la alta aŭ populara kulturo, aŭ pligrandigado de la kono pri la ĉirkaŭanta mondo estas la kerna parto de la turisma programo. Ili estas la plej grava motivo de partopreno en kultura turismo. Inter la turismaj kulturaj valoroj estas: historiaj restaĵoj, konstruaĵoj, festivaloj, koncertoj, ekspozicioj, religiaj ritoj kaj individuaj valoroj, ekzemple la edukaj valoroj de vojaĝo. Kulturan turismon konsistigas vojaĝoj, kiujn oni entreprenas precipe pro kulturaj motivoj, do: ekskursoj por enscenigi spektaklojn, vojaĝoj por partopreni en festivaloj aŭ aliaj kulturaj aranĝoj, pilgrimadoj, vizitado de lokoj kaj historiaj restaĵoj, ekspedicioj por konatiĝo kun la naturo, folkloro, arto (*v.Rohrscheidt*, 2008a). La termino "kultura kunveno" signifas renkontiĝon, kiu ofte en la internacia faka lingvaĵo de kulturologoj estas nomata "evento". Al kulturaj kunvenoj apartenas koncertoj, spektakloj, festivaloj, interparoloj, samkiel individuaj aŭ grupaj kunvenoj de homoj cele al prezentado de diversaj tradiciaj metioj (*v.Rohrscheidt*, 2008b). Tiu turismo ofte estas nomata "aranĝocela turismo". Temas pri aranĝoj, kiuj reprezentas la universalan kulturon. "Grandega aranĝo" estas grandskala kunveno, kiu allogas ĉeestantaron el la tuta mondo. Tian aranĝon karakterizas granda nombro da turistoj, priservado fare de amaskomunikiloj kaj prestiĝo (*K.Buczkowska*, 2009).

Unu el la socioj, kiuj uzas diversajn formojn de turismo, precipe kulturan turismon, estas esperantistoj. Preskaŭ ĉiutage en diversaj partoj de la mondo oni organizas kongresojn, festivalojn, tendarojn kaj aliajn pli aŭ malpli grandajn esperantistajn kunvenojn. En ili plej ofte partoprenas kelkcent personoj el kelkdek landoj, kaj ĉiuj alportas kun si sian propran kulturon. La parola Esperanto disvolviĝas antaŭ ĉio danke al vojaĝoj de es-

perantistoj al la universalaj kaj aliaj internaciaj kongresoj, kunvenoj, festivaloj, Esperantaj kulturaj tagoj.

La plej granda ĉiujara Esperanta aranĝo estas la Universala Kongreso de Esperanto, kiu estis iniciatita en 1905. Partoprenas en ĝi kelkaj miloj da esperantistoj. La kongreso estas organizata ĉiujare en alia lando. Esperantistoj partoprenas en prelegoj, kulturaj spektakloj, diskutas pri problemoj de Esperanto ktp. En unu tago estas planita internacia vespero, dum kiu kongresanoj mem prezentas en la Esperanta lingvo kulturaĵojn de sia lando (*I.Wyszowska*, 2010). Krome, estas proponataj de la organizantoj turismaj aranĝoj. En 2009, okaze de la 150-a naskiĝdatreveno de *L.L.Zamenhof*, la UK okazis en Bjalistoko. Kongreso favoras diskonigon de la urbo kaj lando, en kiu ĝi okazas. En 2011 la UK okazis en Kopenhago kun 1457 partoprenintoj. Grava kunveno por junaj esperantistoj estas la Internacia Junulara Kongreso, kiu ĉiujare okazas en alia lando. Ĝi estas organizata de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), ekde 1938. La kampadejo *Los Cocos*, troviĝanta en la urbo *Santa Cruz del Norte* en Kubo, estis la loko de la 66-a Internacia Junulara Kongreso (IJK), kiu okazis inter la 24-a kaj la 31-a de julio 2010. La kongresanoj povis viziti la urbojn Havano kaj *Matanzas*. Ili povis ankaŭ trovi por si plej diversajn distraĵojn, bonegajn por junulara kaj familia turismo, kiel biciklado kaj ĉemaraj promenadoj.

Inter la mondaj Esperantaj aranĝoj estas ankaŭ la Internacia Kongreso de Fervojistoj-Esperantistoj. En 2011, la Ĉeĥa Fervojista Esperanto-Asocio organizis la 63-an IFEF-kongreson, de la 7-a ĝis la 14-a de majo, en la urbo *Liberec*, kaj postkongreson, de la 14-a ĝis la 18-a de majo, en Prago, la ĉefurbo de la Ĉeĥa Respubliko. La kongreson partoprenis 173 fervojistoj-esperantistoj el 15 landoj. Ĉiujare esperantistoj povas partopreni ankaŭ en du aliaj prestiĝaj Esperanto-aranĝoj, kiuj havas longan tradicion. La Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET) estiĝis kiel Ĉebalta Studenta Esperanto-Tendaro en 1959, kaj okazadis ekde tiam ĉiujare, escepte de du paŭzoperiodoj. Komence, venadis partoprenantoj el la baltaj respublikoj, sed baldaŭ la aranĝo komencis altiri esperantistojn el la tuta tiama Sovetunio. Post la sendependiĝo de la baltaj ŝtatoj BET evoluis al vere internacia renkontiĝo kun riĉa programo. En



BET-46 partoprenis ĉirkaŭ 300 personoj el trideko da landoj. "*ArKoNes*", la alia aranĝo, estas sendependa kultura kaj arta esperantista festivalo en Poznano, Pollando. Ĝi estas unu el la plej grandskalaj kulturaj Esperanto-kunvenoj.

Esperantaj aranĝoj kun kultura-turisma karaktero estas organizataj en ĉiuj kontinentoj, ekzemple:

- En Eŭropo okazis (31 marto – 6 aprilo 2010) la 34-a Internacia Junulara Festivalo (IJF) en Ronĉenjo, en Italio. Krom junularaj programeroj kaj amikeca etoso, okazis ekskursoj tra la montaro, kaj eĉ porinfana festivaleto. En 2011 la IJF okazis en Kievo / Ukrainio kun pli ol 300 partoprenantoj. En Hispanio, en bela mediteranea urbo de *Costa Brava*, okazis (2–9 oktobro 2010) la 18-a Internacia Esperanto-Semajno de Kulturo kaj Turismo. (http://www.eventoj.hu).
- En Azio oni organizis (8 – 9 majo 2010) la 84-an Kongreson de esperantistoj, en *Kjuŝu*, en *Kitakyusyu-si*, Japanio. La gastoj povis ĉeesti en prelegoj, en aŭkcio de esperantaĵoj, en foto-konkurso de esperantistoj, viziti japanajn familiojn kaj partopreni en turismaj ekskursoj.
- En Afriko, en Angolo, oni organizis (10 – 31 januaro 2010) la aranĝon "Malkovru la misteran landon".
- En Ameriko okazis (22 – 24 de majo 2010) la 7-a MEKARO – "Mez-Kanada Renkontiĝo" de Esperanto ĉe Tririveroj, en Kebekio, Kanado. Tio estis turisma amikeca semajnfino, dum kiu okazis vizitoj kaj komunaj manĝoj en restoracioj.

Krom mondaj kaj internaciaj kunvenoj ĉiujare oni organizas en diversaj partoj de la mondo regionajn kunvenojn de esperantistoj. De multaj jaroj esperantistoj povas partopreni ankaŭ en aliaj kunvenoj kun turisma-ripoza karaktero, ekzemple:

- En Mielno, apud la urbo *Koszalin*, okazis (15 – 23 junio 2010) la 32-a "Ĉebalta Esperantista Printempo" kun riĉa kaj varia Esperantoprogramo. Interalie, oni organizis komunan kantadon, ekskursojn al *Koszalin* kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. La partoprenantoj povis praktiki la tradician ĉinan gimnastikon *Tai Chi ĉhuan*. En la aranĝo partoprenis ĉirkaŭ 80 geesperantistoj el 12 landoj. La "Ĉebaltaj Esperantistaj Printempoj" okazas ekde 1992.
- FREŜO - la Frusomera Renkontiĝo de Esperantistoj Ŝatantaj *Olsztyn*, en Pollando, estas E-aranĝo kun riĉa kultura programo. Ekzemple, en 2010, faris kelkajn koncertojn la en Esperantujo

konata franca kantisto kaj gitarludanto, *Jean-Marc Leclercq* (JoMo). Multaj programeroj de la aranĝo rilatis al la urbo *Olsztyn* kaj la *Varmia-Mazuria* regiono. La lokuloj montris siajn vidindaĵojn al la partoprenantoj, kaj tiuj dividis kun loĝantoj de *Olsztyn* parton de sia kultura programo.

- En *Szczawno-Zdrój* oni organizis la 43-an Internacian Esperanto-Feriadon kaj samtempe la 1-an Filman Esperantistan Feriadon (24 julio - 1 aŭgusto 2010). Tiu aranĝo estas daŭrigo de la tradicia feriado, kiu okazadis en *Międzygórze*, en la jaroj 1965-1990, kaj poste en aliaj sileziaj ripozlokoj. Tiu aranĝo ĉiam ofertas riĉan turisman programon kaj diversgradajn E-kursojn. En 2010 kompletigis ilin allogaĵo: filmoj kaj prelegoj de red. *Roman Dobrzyński*.

Esperantajn vojaĝojn iam organizis la vojaĝoficejo *Esperantotur*, kiu estis fondita de la esperantisto *Andrzej Grzębowski*, en *Bydgoszcz*. Li estis ankaŭ la fondinto de la Internacia Asocio Monda Turismo, kiu funkciigis interalie la Internacian Studumon de Turismo kaj Kulturo, kursojn por turismaj gvidantoj, vojaĝojn de turistaj grupoj al Esperantaj aranĝoj en multe da landoj. Dum multaj jaroj *Bydgoszcz* estis organiza centro de Esperanto-turismo en la landa skalo, kaj nun ankaŭ en internacia skalo.

En 2002 oni organizis la Internacian Centron pri Kulturo kaj Turismo "Kujavio kaj Pomerelio", realigantan edukadon en Esperanto de fakuloj por turismo kaj kulturo. La centro kunlaboras kun instruistoj el pli ol 60 landoj de la mondo. En ĝi lernas turismajn profesiojn studentoj el 90 landoj. La diplomoj de la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo validas kiel oficialaj polaj dokumentoj, rajtigantaj ĉiĉeronojn kaj vojaĝgvidantojn labori en Esperanto. Kelkcent vojaĝgvidantoj kaj ĉiĉeronoj havas legitimilojn de la lernejo, en kiuj estas mencio pri la lingvo Esperanto.

En Pollando, en la sfero de internacia turismo kaj edukado, Esperanto havas plenan leĝan rekonon, do sufiĉas nur agi laŭ tiuj leĝoj por disvolvi internacian Esperanto-turismon kaj akiri plian rekonon de Esperanto en la faka sfero. Informoj pri edukado en la centro de Esperanta turismo en *Bydgoszcz* estas dissendataj al 5000 retadresoj en la mondo (*A.Grzębowski*, 2011). Danke al Esperanto, vojaĝoj estas interesaj, ĉar oni povas renkontiĝi dum ili kun lokaj Esperantoparolantoj, kaj eĉ amikiĝi kun ili. Junaj homoj,



kiuj konas aŭ lernas la Esperantan lingvon, danke al Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) povas partopreni seminariojn, kongresojn, kursojn k.a. TEJO funkciigas ankaŭ apartan internacian reton por individua turismo. Ĝi nomiĝas "Pasporta Servo". Ĝi faciligas interkulturajn kontaktojn per gastigado/gastado en domoj de esperantistoj. Listo de nomoj kun kontaktinformoj pri la personoj, kiuj proponas tranoktojn en sia hejmo por unu aŭ kelkaj personoj, troviĝas en ĉiujare ĝisdatigata aparta libreto. En la eldono de 2010 estas 1450 adresoj el 91 landoj. Sufiĉas malfermi la libreton, rigardi la nomon de la lando kaj oni scias, kie oni povas plani ekskurson. La personoj, kiuj gastigas esperantistojn estas tre scivolaj pri la gastoj kaj iliaj landoj. Tio ofte kondukas al longaj interparoloj kaj amikeco. Komuna kono de Esperanto fare de la gasto kaj la gastiganto permesas al la vizitanto partopreni en la vivo de loĝantoj de alia lando, ekkoni aliajn kulturojn, kutimojn kaj laboron. Multe da junaj homoj aprecas vojaĝliberecon (*M.Jamka,* 2005).

Kono de Esperanto kaj kontaktoj kun esperantistoj faciligas ĝustan ekkonon de la vizitata lando, ĝia kulturo, ĝiaj tradicioj kaj la kutimoj de ĝiaj loĝantoj. Tiamaniere persono, kiu konas Esperanton povas havi en multaj landoj amikojn, kiuj povas helpi. Ŝatantoj de biciklado asociiĝis en la faka asocio "Biciklista Esperantista Movado Internacia". BEMI estas grupo de esperantistoj, kiuj vojaĝas kun aliaj membroj, biciklante. Ili organizas almenaŭ unu internacian biciklo-karavanon ĉiujare, kutime al Esperanta aranĝo, sed ankaŭ servas interkontaktante biciklistojn-esperantistojn (Bicikla Esperantista Movado Internacia, Amikeca Reto, 2002-2003 kaj Jarlibro de UEA, 2010 / 2011).

**Konkludo**

Esperanto estas lingvo, kiu ne nur faciligas internacian komunikadon, sed ankaŭ interetnan kaj interkulturan komunikadon. Grava vojo al interhomaj rilatoj estas la turismo. Estas diferenco inter la tradicia turismo (ekzemple tiu organizata de vojaĝoficejoj) kaj la "Esperanta turismo". La Esperanta kulturkoniga turismo estas komunika turismo. Ĝia alvokiteco, krom la formoj kaj celoj jam konataj en la ĝenerala kultura turismo, estas ebligado de ekkonado de kulturoj per rektaj interhomaj interŝanĝoj, kio, aldone,

kondukas al internacia kompreniĝo, kaj tiu - se larĝskala - favoras pacon. Reciprokaj kontaktoj de esperantistoj pere de turismo kondukas al reciproka estimo kaj toleremo malgraŭ naciaj, religiaj, ideologiaj kaj aliaj diferencoj. Tia kultura turismo konstruas novan solidarecon inter homoj kaj liveras bazon por ellaboro de formoj de kunlaboro, kiu transpaŝas la limojn de regionoj, landoj kaj kulturoj. Tiu fenomeno estas sufiĉe vasta pro la fakto, ke Esperantaj aranĝoj kutime havas kulturturisman karakteron. Tiu karaktero rezultas de la bezonoj de la Esperanto-parolantoj. La ĉefaj bezonoj de esperantistoj estas komunikado kaj ekkono de larĝsenca kulturo de popoloj de aliaj landoj.

**Bibliografio**

1. *A. Grzębowski* (2011), *Esperanto en Bydgoszcz, pli ol 100 jaroj*, http://www.esperanto.bydgoszcz.eu (20.04.2011).
2. Informoj pri ArKoNes kaj Baltiaj Esperanto-Tagoj sub aŭspicioj de UEA, [en:] Gazetaraj Komunikoj de UEA, n-ro 360, http://www.uea.org/dokumentoj/komunikoj/nav gk.php?jaro=2010, (21.01.2010).
3. Informo pri Bicikla Esperantista Movado Internacia, en *Amikeca Reto*, 2002-2003, kaj *Jarlibro* de Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, 2010.
4. Informo pri Internacia Junulara Festivalo 2010 en Internacia Kalendaro de Esperanto-aranĝoj, http://www.eventoj.hu.
5. *I. Wyszowska* (2010), *Turystyka esperancka jedną z propozycji współczesnego podróżowania*, [en:] Współczesne podróże kulturowe, red. M. Kazimierczak, Poznań.
6. *K. Buczkowska* (2009), *Kulturowa turystyka eventowa*, [en:] Współczesne formy turystyki kulturowej, red. K. Buczkowska kaj M. von Rohrscheidt, Poznań.
7. *M. Jamka* (2005), *Odkrywanie świata w zasięgu ręki*, "Multis Multum", Magazyn Studencki WSZIB, Kraków.
8. *M. von Rohrscheidt* (2008), *Turystyka kulturowa. Fenomen, potencjał, perspektywy*, Gniezno.
9. *M. von Rohrscheidt* (2008), *Turystyka Kulturowa – wokół definicji.* Interreta revuo: www.turystykakulturowa.org, n-ro 1/2008.
10. *W. Gawarecki* (1997), *Turystyka*, Warszawa.

**Adreso de la aŭtorino**

*D-rino Dorota MĄCZKA*
*ul. Mlynarska 22/28*
*PL 08-110 Siedlce* / POLLANDO <dorciapoczta@op.pl>

**Priaŭtora informo**

La aŭtorino estas doktorino de historio, lekciistino pri historio de arĥitekturo, arto kaj kulturo en la Instituto de Turismo de la Ŝtata Supera Lernejo de *Biała Podlaska*, Pollando. Krome, kiel ĉiĉeronino, ŝi interesiĝas pri historio kaj kulturo laŭ turisma aspekto. Ŝi publikigis du librojn kaj kelkdek artikolojn.



# Klasika muziko dudekajarcenta

*Franz-Georg RÖSSLER*

Parolante pri "moderna muziko", en amasa socio kiel la aktuala oni devas klarigi, ke, apud la daŭre radie, televide kaj koncerte disvastigata populara muziko nuntempa, ekzistas kontinue la daŭrigado de la "akademia, serioza, klasika" muziko en la sekvo de la konataj korifeoj kiel *Palestrina, Schütz, Bach, Mozart, Beethoven, Schubert, Wagner, Verdi* ktp. La nunaj reprezentantoj de tiu ĉi branĉo plej ofte estas profesoroj en muzikaltlernejoj kun bonaj kontaktoj al muzikdisvastigaj institucioj kiel radiostacioj, orĥestroj kaj eldonejoj.

## *Hans Vogt* – reprezentanto de la "Nova muziko"

Unu el tiuj komponistoj estis *Hans Vogt*, germano, kiu naskiĝis la 14an de majo de la jaro 1911 en *Danzig* (tiam Germanujo) ekzakte antaŭ unu jarcento, kaj mortis la 19an de majo en la jaro 1992. Laŭ ties profesia evoluo oni povas traspuri la defiojn, problemojn kaj ŝancojn de muzikkreanto de lia generacio.




*Vogt* post la studado en Berlino / Germanujo fariĝis dirigento, oficante ĉe diversaj orĥestroj kaj operejoj. Intervenis la Dua mondmilito, kiun li ja transvivis, sed devis postvivi en sovetiaj kaptitejoj ĝis 1949. Reveninte li translokiĝis al la Suda Germanujo kaj fariĝis docento – poste profesoro – ĉe la Muzikaltlernejo Manhejmo-Hejdelbergo. Altlerneje li deĵoris kiel instruanto de la muzikteorio kaj de la komponado. Apude li abunde komponis mem kaj elverkis – krom aktualajn artikolojn kaj prelegotemojn – du "normigajn librojn", nome *"Neue Musik seit 1945"* / "Nova muziko post 1945" kaj "La ĉambromuziko de *J. S. Bach*", kiuj aperis en la renoma eldonejo *RECLAM*. Aldone li estis la fondinto de la "Asocio por Nova muziko Manhejmo" kaj ties longajara organizanto. Pere de tiu ĉi in-